

# *Lingvo Internacia*



*Duonmonata gazeto*

*por*

## *Esperanto*

*eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato*

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V°

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

## ONI ABONAS L. I. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanieviĉ*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjaĉeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono **5 frankoj**, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. florenoj = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono **7,50 fr.**

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la Kongreso 60 centimoj.

**Pago por anoncoj:** 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» pres-literoj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ŝes presoj: 10 %

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por  $\frac{3}{4}$  de ilia valoro.

---

## VORTAREGO

## FRANCO-ESPERANTA

kunlabore redaktata de diverslandaj esperantistoj, sub kontrolo de «Lingvo Internacia» kaj de «L'Espérantiste»

Prezo: 17 frankoj. — Prospekton senpage.

La tuta verko enhavas proksimume 80 kajerojn da 16 paĝoj! — Unu kajero da 16 p. vendita aparte: 50 centimoj, aŭfranke 55 c.

**PRESA ESPERANTISTA SOCIETO**

**33, rue Lacépède, PARIS**

---

# Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

15 aŭgusto 1906

<b>P. Corret</b> : Esperanto kaj Lingvoscienco	457
<b>Selma Lagerlöf</b> : La Almozulo (tradukis <i>John Lundgren</i> ).	460
<b>Miksajoj</b> : El la historio de l' gazetarto. — Arta nutraĵo de kreskaĵoj. — Bagateloj	465

## *Tra la Mondo Esperantista :*

<b>N. P. Evstifeff</b> : Al S-ro G. Kolovrat ( <i>Daŭrigo kaj fino</i> )	469
--	-----

**Nia aldono literatura** (paĝoj' 241-256) : *Aventuroj de l'lasta Abencerago*, de CHATEAUBRIAND (Tradukis H. DESHAYS), *daŭrigo kaj fino*, — kaj *Veto*, de A. ČEHOV (tradukis BORISO KOTZIN, *komenco*).

## ESPERANTO KAJ LINGVOSCIENCO

La 13-an de Februaro de la nuna jaro, Sinjoro A. Meillet, profesoro de Gramatiko komparata ĉe la *Collège de France*, faris la unuan lecionon de sia kurso pri la jena temo: « La nuna stato de l'studoj pri ĝenerala lingvoscienco. »

El tiu ĉi rimarkinda leciono ni prezentas hodiaŭ tradukitajn fragmentojn, kiuj certe interesos la Esperantistojn, montrante, kiel bone akordiĝas Esperanto kun la ĝeneralaj leĝoj regantaj la lingvojn dum ilia evolucio, kaj ankaŭ, kiel malpravaj estas niaj kontraŭuloj, kiam ili pretendas, ke certe nia lingvo iam perdos sian unuecon, kaj disfalos en dialektojn reciproke nekomprenablajn por la loĝantoj de la diversaj landoj.

Montrinte, kiel necese estas formuli la ĝeneralajn leĝojn, laŭ kiuj efektiviĝas ŝanĝoj en la diversaj lingvoj, la eminenta

profesoro citas kelkajn ekzemplojn, kaj klarigas unue, laŭ kiu leĝo iom post iom difektigas konsonanto inter du vokaloj.

Poste li daŭrigas:

« Same, la ĉiam pli plena forigo de la malsimplaj fleksioj de l'indo-eŭropa lingvo dum la evolucio de la diversaj dialektoj povas esti klarigita per ĝenerala formulo montranta la psikan kaŭzon de l'fenomeno. Jam en la komuna epoko indo-eŭropa, la formoj karakterizantaj ununuran gramatikan kategorion estis diferencaj laŭ la vortoj, kaj ankaŭ laŭ aliaj gramatikaj kategorioj; ili estis diferencaj laŭ la vortoj, ekzemple la estanta optativo λύοι de l'greka verbo λύω estas tute alie formita ol la aorista optativo λύσειε de la sama verbo; kaj la unua persono de multenombro εἶμεν « ni estu » tre diferencas de la unua de l'ununombro εἶην. Nu, ĉie kaj ĉiam la lingvoj emas forigitan malunuecon, kaj akcepti unuecon de formo por unueco de gramatika rolo kaj signifo. Tia rezultato riceviĝas per diversaj rimedoj, ofte per ĝeneraligo de unu procedo; tiel la unua persono multenombra estas karakterizata de -ons en ĉiuj francaj verboj. Alia procedo tre ofte uzata estas forigo de tro malsimplaj formoj. »

Cu Esperanto ne estas perfekta aplikaĵo de tiuj principoj? Ni ja vidas ĉie en ĝi perfektan « unuecon de formo por unueco de gramatika rolo kaj signifo. » Ĉiu substantivo finiĝas per o, ĉiu adjektivo per a, ĉiu rekta komplemento per n... — unueco de formo por unueco de gramatika rolo; ĉiuj nomoj de instrumentoj finiĝas per -ilo, ĉiuj nomoj de profesiuloj per -isto... unueco de formo por unueco de signifo.

Kaj en la verboj troviĝas vere mirinda ĝeneraligo de unu procedo » kaj samtempe ankaŭ « forigo de tro malsimplaj formoj. » Nur unu konjugacion havas ja Esperanto absolute ĝeneralan kaj regulan por ĉiuj verboj, kaj en ĉiu tempo ĉiuj personoj idente finiĝas. Aliparte ĝi ĉiam uzas formojn kiel eble plej simplajn, kiel ekzemple en la tempoj de l'estinteco la senparticipan formon *mi vidis*, anstataŭ *mi estas vidinta* aŭ *mi estis vidanta*.

Al tiuj personoj, kiuj pretendas, ke *arta* lingvo ne povas ekzisti, ni do povas montri, ke Esperanto ĝuste obeas la *naturajn* leĝojn, kiuj regas la lingvojn en ilia evolucio, kaj diferencas de ili nur per sia mirinda reguleco kaj facileco.

Sed ĉu tia evolucio mem ne estos iam kaŭzo, ke la Esperantistoj ĉesos interkompreniĝi? Cu la estonta « evolucio » de

Esperanto ne fariĝos malsame en diversaj partoj de tiu grandega lando, kiu estas Esperantistujo?

Ankoraŭ tiun demandon respondas S-ro Meillet, studante en sia leciono la socialajn kaŭzojn de la lingvaj okazoj. « Lingvo, li diras, estas esence sociala fakto. Oni ofte rediras, ke lingvo ne ekzistas ekster la homoj, kiuj ilin parolas, kaj sekve oni ne rajtas aljuĝi al ili sendependan ekziston, propran vivon. Tiu estas evidenta konstato, sed nenion pruvas, kiel la plimulto el la evidentaj diroj. Kvankam realeco de lingvo ne estas io materia, ĝi tamen ekzistas. Tiu ĉi realeco estas samtempe lingva kaj sociala.

Ĝi estas lingva, ĉar lingvo konsistas el malsimpla sistemo da esprimoj, en kiu ĉiuj partoj estas kunligitaj, kaj *en kiu individua novaĵo malfacile povas akceptiĝi, se, devenante de pura kaprico, ĝi ne ĝuste akordiĝas kun la ĝeneralaj reguloj de la lingvo.*

Je alia vidpunkto, la realeco de lingvo estas sociala: ĝi rezultas de tio, ke lingvo apartenas al difinita aro da parolantaj homoj, ke ĝi estas komunikilo inter la membroj de unua grupo, kaj ke neniu el la membroj de la grupo povas fari en ĝi ŝanĝojn. *La neceso mem esti komprenata trudas al ĉiuj membroj konservadon de la plej plena identeco de la lingvaj uzoj.* Ridindeco estus la tuja puno de ĉiuj individuaj deflankiĝoj, kaj en la modernaj societoj oni rifuzas la ĉefajn oficojn, per ekzameno, al tiuj el la landanoj, kiuj ne scias obei la regulojn de la lingvo kelkafoje iom arbitrajn, sed konsente akceptitajn de la tuta anaro. Kiel tre bone diris S-ro Bréal en sia *Essai de Sémantique*, la limigo de la libereco, kiun havas ĉiu homo, fari ŝanĝojn en sia lingvaĵo « devenas de la bezono esti komprenata, t. e. ĝi estas samspeca, kiel la aliaj leĝoj regantaj nian socialan vivadon. »

Ni do ne timu, ke iam ni ne povos nin kompreni reciproke per Esperanto; pri tio nin trankviligas la plej eminentaj majstroj de la lingvoscienco. Ĉu tio signifas, ke nia lingvo neniam kaj neniel ŝanĝiĝos aŭ evolucios? Tute ne: same kiel evolucias la propraj lingvoj de la diversaj landoj, tiel ankaŭ povos evolucii la lingvo de Esperantujo; sed same kiel la loĝantoj de tiuj landoj ne ĉesas eĉ unumomente kompreni unu la alian, tiel ankaŭ ĉiam interkompreniĝos la loĝantoj de Esperantujo.

## LA ALMOZULO

El « *Legendo de Gustavo Berling* » de sveda verkistino **Selma Lagerlöf**

Ian malvarman tagon de decembro iras almozulo supren, laŭ la montetoj de Brobi. Lin vestas plej mizeraj ĉifonoj, kaj liaj ŝuoj estas tiom trouzitaj, ke malvarma neĝo malsekigas liajn piedojn.

*Leven* estas nomita longa, mallarĝa lago en provinco Vermland, kaj en du lokoj ĝiaj bordoj pliproksimiĝas je mallarĝaj lagkoloj. Ĝi sin entendas norden ĝis arbaroj, kie Finnoj loĝas, kaj suden al lagego Venern. Multaj paroĥoj kuŝas laŭlonge ĝiaj bordoj, sed plej granda kaj riĉa el ili estas paroĥo Bro. Tiu ĉi okupas grandajn partojn de orienta kaj okcidenta bordoj, sed en okcidenta bordo oni trovas plej grandajn bienojn, bienojn laŭditajn pro riĉeco kaj beleco, kiel Ekebi kaj Bjerne, kaj grandan vilaĝon Brobi kun gastejo, juĝejo, poliestra domo, pastroloĝejo kaj forira placo.

Brobi troviĝas en kruta deklivo. La almozulo jam iris preter la gastejo, kiu estas en la malsupro de l'monteto, kaj penadis supren al pastroloĝejo, kiu kuŝas plej alte.

Sur la kruta vojo iras malgranda knabino antaŭ li, tirante glitveturilon ŝargitan per farunsako. La almozulo atingis la knabinon, kaj ekparolis ŝin.

« Tio malgranda ĉevalo antaŭ tiom granda ŝarĝo », li diris.

La infano sin turnis kaj ekrigardis lin. Estis malgrandulino dekdujara, kun esploremaj, malafablaj okuloj kaj kunpremitaj lipoj.

« Dio faru, ke la ĉevalo estu pli malgranda kaj la ŝarĝo pli granda, kaj ĝi daŭrus pli longe », respondis la knabino.

« Ĉu vi do hejmen tiras vian propran nutraĵon? »

« Ho jes, certe! Mi devas havigi manĝaĵon por mi mem, kiom ajn malgranda mi estas. »

La almozulo prenas angulan palison de la glitveturilo, por ŝovi helpe.

La knabino sin turnas, ekrigardante lin.

« Vi ne kredis, ke vi ion ricevos pro tio », ŝi diris.

La almozulo ekridis.

« Vi ŝajnas esti filino de la pastro en Brobi. »

« Tiel mi estas. Pli malriĉajn patrojn multaj havas, sed neniŭ havas pli malbonan. Lia propra infano diras tion tute vere, kvankam honte.

« Oni diras pri via patro, ke li estas avara kaj malica. »

« Avara li estas, kaj malica li estas, sed lia filino estos ankoraŭ pli malbona, se ŝi vivos, diras homoj. »

« Mi pensas, ke homoj estas pravaj. Mi tre deziras scii, kie vi trovis tiun ĉi farunsakon. »

« Ne estas grave, se mi diras tion al vi. En mateno mi prenis grenon en grenejo de l'patro, kaj nun mi venas de la muelejo. »

« Ĉu li ne vidos vin, kiam vi ĝin tiras hejmen? »

« Sajnas, kvazaŭ vi estus tro malsperta. Patro vizitas malsanulon, vi povas kompreni. »

« Iu veturas post ni. Mi aŭdas grincon kaj glitveturilon. Pensu, ke li eble venas! »

La knabino aŭskultis explore, kaj tuj ŝi ekploregis.

« Jes, jen estas mia patro », ŝi ekĝemis. « Li min mortigos. Li min mortigos. »

« Jes, bonaj konsiloj nun estus ŝatindaj, kaj rapidaj konsiloj pli valoraj ol oro aŭ arĝento », diris la almozulo.

« Vi povas helpi min », la infano diris. « Prenu la ŝnuregon, kaj tiru la veturilon, kaj patro kredos, ke ĝi apartenas al vi. »

« Kiel mi poste agos per ĝi? » demandis la almozulo, metante la ŝnuregon sur sian ŝultron.

« Nun tiru ĝin kien ajn, sed venu kun ĝi al pastrodomo, kiam mallumiĝos. Mi atendos vin. Venu kun la sako kaj la veturilo, vi komprenas. »

« Mi provos. »

« Petu de Dio, ke li kompatu vin, se vi ne venos », kriis la knabino, dekurante por atingi la hejmon antaŭ ol la patro.

Kun malgaja koro la almozulo turnis la glitveturilon kaj kaj ĝin ŝovis malsupren al la gastejo.

Tiu ĉi mizerulo ŝonĝis, dum-li iras en neĝo preskaŭ nudpiede. Li pensis pri vastaj arbaroj norde de Leven, pri la grandaj arbaroj, kie Finnoj loĝas.

Tie ĉi en paroĥo Bro, kie li nun iras laŭlonge la lagkolo, kiu kunigas Nordan kaj Sudan Leven, en tiu ĉi fama regiono de riĉeco kaj ĝojeco, kie bieno kuŝas apud bieno, farejaro apud farejaro, tie ĉi estas ĉiu vojo tro mallarĝa al li, ĉiu ĉambro tro mallarĝa, ĉiu lito tro malmola. Tie ĉi li devas maldolĉe sopiri pri paco de l'grandaj, eternaj arbaroj.

Tie li aŭdis draŝilojn el ĉiu draŝejo, kvazaŭ neniam eldraŝiĝos la greno. Stipaj kaj karbaj ŝarĝoj venas senĉese el la neelĉerpeblaj arbaroj. Senfina aro da ferŝtonaj ŝarĝoj antaŭeniras en profundaj sulkoj, kiujn centoj da antaŭirantoj faris en la vojo. Tie ĉi li vidas glitveturilojn, plenajn je veturantoj, rapidi inter la bienoj, kaj ŝajnas al li, kvazaŭ la ĝojeco tenas kondukilojn, kaj beleco kaj amo staras sur la glitiloj. Ho, kiom tiu ĉi kompatindulo tie iranta sopiris pri paco de la grandaj, eternaj arbaroj!

Tie en la malproksimaĵo, kie arboj staras rektaj kaj kolon-similaj sur ebena fundo, kie dikaj amasoj da neĝo kuŝas sur la senmovaj branĉoj, kie la vento estas senpotenca kaj nur trankvile brulas en la najlofolioj de la supraĵoj arbaj, tie li iros pli kaj pli internen, ĝis tago, kiam li perdos forton, kaj mortiganta pro malsato kaj malvarmo li falos sub grandaj arboj.

Li sopiris pri la granda, bruanta tombo norde de Leven, kie la potenca pereigiĝeco venkos lin, kie fine prosperos malsato, malvarmo, laceco kaj brando pereigi tiun ĉi bedaŭrindan korpon, kiu ŝajnas toleri ĉion.

Li venis en la gastejon kaj intencis tie atendi la vesperon. Li eniris la drinkejon kaj sidiĝis sur benkon apud la pordo, en apatia ripozo, songante pri la eternaj arbaroj.

La mastrino kompatis por li, kaj donacis al li glason da brando. Si donacis eĉ duan, ĉar li tiom fervore petis.

Sed pli multe ŝi ne volis donaci al li, kaj la amozulo ekmal-esperis. Li devas trinki pli, multe da tiu ĉi multegusta, dolĉa brando. Li ree sentos la koron dancantan en la korpo, kaj havos pensojn flamajn en ebrieco. Ho, tiu dolĉa grenvino! Suno somera, birdkantado somera, odoro kaj beleco someraj naĝas en ĝia blanka ondo. Ree, antaŭ ol li malaperos en nokto kaj mal-lumo, li deziras trinki sunon kaj feliĉon.

Tial li unue ŝanĝis la farunon, poste la sakon, kaj fine la glitveturilon por brando. Per ĝi li sufiĉe malsobriĝis, kaj dormadis sur benko en la drinkejo grandan parton de la posttagmezo.



Maldormiĝante li komprenis, ke nur unu agon li faros. Ĉar tiu ĉi honta korpo prenis ĉiom da potenco el lia animo, ĉar li povis aĉeti brandon pro tio, kion infano konfidis al li, ĉar li malhonorigas la teron, li liberigos ĝin je ŝarĝo el tiom da malboneco. Li donos liberecon al sia animo, lasos ĝin vivi al Dio!

Li kuŝis sur benko en la drinkejo juĝante sin mem; « Gustavo Berling, eksigita pastro, kulpigata, ke li fordrinkis farunon de malsata infano, estas kondamnata morti. Kia morto? La morto en neĝamasoj. »

Li ekprenis sian ĉapon, kaj eliris ŝanceliĝe. Li estiis nek tute maldorma, nek tute sobra. Li ploris pro kompato pri si mem, pri sia bedaŭrinda malpurigita animo, kiun li liberigos.

Li iris ne longe nek flanken de l'vojo. Apud la vojo kuŝis alta neĝamaso, tien li sin malstarigis por morti. Li fermis la okulojn, kaj provis ekdormi.

Neniu scias kiom da tempo li tiel kuŝis, sed li vivis ankoraŭ, kiam, kuranta laŭlonge la vojo, venis kun lanterno en mano la filino de l'pastro en Brobi, kaj lin trovis en la neĝamaso apud la vojo. Ŝi multajn horojn estis atendinta lin. Nun ŝi kuris malsupren je la monteto por serĉi lin.

Ŝi tuj rekonis lin, kaj tiel ŝi komencis skui lin kaj krii tutforte por lin veki.

Ŝi volis scii, kien li metis ŝian farunsakon.

Ŝi volis revivigi lin, almenaŭ por tiom da tempo, ke li povos diri, kio okazis je ŝia glitveturilo kaj ŝia farunsako. La patro batos ŝin ĝis morto, se ŝi formalzorgis lian glitveturilon. Ŝi mordis la almozulon je fingro, kaj gratis lian vizaĝon, kaj dume ŝi kriis kvazaŭ malesperulino.

Ia veturanto venas sur la vojo.

« Kiu krias? » demandas severa voĉo.

« Mi volas scii, kien jena viro metis mian farunsakon kaj mian glitveturilon », ĝemis la infano, kaj batis per pugno bruston de l'almazulo.

« Ĉu glaciigulon vi gratas tiamaniere? Starigu, sovaĝa kato! »

Veturantino estas granda forta virino. Ŝi elpaŝis el sia glitveturilo, kaj venis al la neĝamaso. La infanon ŝi ekprenis je la nuko kaj ĵetis sur la vojjon. Poste ŝi malsuprenkliniĝis, metis la brakojn sub korpon de l'almozulo kaj levis lin. Ŝi portis lin al la glitveturilo kaj kuŝigis lin tien.

« Akompanu en la gastejon, sovaĝa kato », ŝi vokis al la pastrofilino, « ke mi aŭdu tion, kion vi scias pri tiu ĉi afero! »

Unu horon pli malfrue sidas la almozulo sur seĝo apud la pordo en plej eminenta ĉambro de la gastejo, kaj antaŭ li staras tiu aŭtoritata sinjorino, kiu lin savis el la neĝamaso.

Mil fojojn Gustavo Berling jam aŭdis rakontojn pri tiu virino, kiun li nun vidis hejmenvenantan post karboveturigo en arbaroj, kun fulgaj manoj kaj kun argila pipo en la buŝo, vestitan per ŝaffela mallonga pelto kaj stria hejmeteksita l-n-jupo, kun ŝuoj de plej dika speco, kaj kun tranĉilingo ĉe la talio, kun griza haro, rekte suprenstrekita super maljuna, bela vizaĝo, kaj li komprenis, ke li renkontis la faman majoredzinon de Ekebi.

Si estis plej potenca virino en Vermlando, regantino de sep farejaroj, kutiminta ordoni kaj obeigi; kaj li nur estis al morto kondamnita mizerulo, al kiu ĉio mankas, kiu scias, ke ĉiu vojo estas al li tro malĉarma, ĉiu ĉambro tro malvasta. Lia korpo skuiĝis pro teruro, kiam ŝi rigardis lin.

Silenta ŝi staris vidante tiun ĉi homan mizeron antaŭ si, la ruĝajn, ŝvelintajn manojn, la malgrasiĝintan aperaĵon, kaj la ravan kapon, kiu malgraŭ ruiniĝo kaj malzorgo tamen brilas per natura belegeco.

« Ĉu vi estas Gustavo Berling, la freneza pastro? » ŝi diris demande.

Senmove sidis la almozulo.

« Mi estas la majoredzino de Ekebi. »

Ektremis la korpo de l'almozulo. Li kunmetis siajn manojn, kaj altigis sopiran rigardon. Kion ŝi faros al li? Ĉu ŝi devigos lin vivi? Li timis ŝian forton. Kaj tamen li tiom estis proksima al la paco de l'eternaj arbaroj.

La batalon ŝi komencis per sciigo, ke la filino de la pastro ricevis siajn veturilon kaj farunsakon, kaj ke ŝi mem, la majoredzino, havas rifuĝon por li, kiel por multaj aliaj senhejmaj bedaŭrinduloj, en la kavalira flankdomo de Ekebi. Si proponis al li vivon kun ludado kaj ĝojo, sed li respondis, ke li volas morti.

*Esperanten transskribis* JOHN LUNDGREN.

(Daŭrigota.)

## MIKSAĴOJ

**El la historio de l' gazetarto.** — Versajne malmulte da niaj legantoj scias, ke la fondinto de l' gazetverkado estis Julio Cezaro, kiu siajn dise estantajn legionojn tiamaniere sciigis pri la okazintaĵoj, ke li dissendis al ili, per kuristoj, dokumentojn nomatajn *acta*. El tiu *acta* oni povis legi ĉiun freŝe okazintan rimarkindaĵon. Poste oni pliprecizigis la *acta*-ojn, kaj privataj personoj ankaŭ redaktis tiajn primitivajn gazetojn. La redaktoroj de tiuj gazetoj estis nomataj *actuarii*, — kaj tiuj personoj, kiuj kolektis la temojn por la enmetindaĵoj, verkante ilin por la gazeto (do la ĵurnalistoj): *notarii*.

En la sekvinta barbara epoko tute malaperis eĉ tiaj primitivaj gazetoj. La postsignojn de l' ekzistanta gazetarto ni trovas el la jaro 1447 p. Kr., en Germanujo kaj Italujo. La unua presita ĵurnalo aperis en Antwerpen en 1605 kaj havis la titolon *Nieuwe Tijdingen*. Ĝia redaktoro estis Abrahamo Berhoeven, kaj ĝi enhavis plejparte militajn komunikaĵojn. De tiu tempo en aliaj landoj oni ankaŭ fondis gazetojn, sed en multaj landoj ili ne redaktiĝis en la lingvo de l' lando, sed fremdlingve, — tiel ekzemple, en Hungarujo, la unua gazeto fondiĝis en la komenco de l' 18-a jarcento, en lingvo latina.

Estas interese scii ion pri la grandecoj kaj formoj de diversaj gazetoj. Ekzemple, en la jaro 1829, la redakcio de l' *Atlas*, en Londono, eldonis unu tian numeron de sia gazeto, kies longo estis 5 futoj kaj la larĝo 4 futoj. Unu New-York'a gazeto, kiam oni proklamis la sendependecon de la Unuigitaj Statoj Nord-amerikaj, eldonis — por plezurigi siajn legantojn — tian festan numeron, kies longo estis 478 centimetroj kaj la larĝo 256 centimetroj. Oni presis gazetojn ankaŭ sur papero nemalsekiĝema, por ke oni povu legi ilin ankaŭ dum la bano en la akvo; eĉ sur speciala tolo, kiujn oni, post la lego, provis utiliĝi kiel viŝilon aŭ sinvindilon. — En Madrid, en la komenco de tiu ĉi jarcento, oni eldonis lumigantan gazeton titolitan *Luminaria*. Tiu ĉi gazeto estis presita per inko sulfumita, kiu lumigis, kaj oni povis legi la gazeton ankaŭ en mallumo.

Estas interese ankaŭ, kiaspecajn bizarajn reklamojn la gazetistoj uzis, por varbi abonantojn. — Jen unu ekzemplo. La

franca gazeto *Bien-être*, vivinta mallongatempe, tiamaniere penadis varbi abonantojn, ke ĝi, post 30-jara abonado, promesis pagi jaran salajron kaj senpagan enterigon al la aboninto! Bedaŭrinde, tiel malmulte da personoj deziris ĝui la salajron kaj la senpagaĵ enterigon, ke la gazeto mem « enterigis » sin post 30-taga vivado...

Multajn malfacilaĵojn devis venki la gazetarto, dume ĝi atingis sian nunan perfektecon.

*El hungara trad. HUGO REGÉCZY.*

**Arta nutrado de kreskaĵoj.** — Kreskaĵoj, simile al homo kaj bestoj, estas malsaniĝeblaj; tiuj ĉi malsanoj estas kaŭzataj ne tiom de difekto de organoj, plenumantaj tiun aŭ alian agadon, kiom de manko de necesaj fizikaj kondiĉoj, liverantaj ĝian regulan nutrado, ekzemple: lumo, temperaturo, atmosfero kaj, aparte, tero. Oni scias, ke radikoj de kreskaĵoj liveras al ili ĉefe tiun materialon, kiu, formigante (formante) esencan parton de ilia organismo, post bruligo de kreskaĵoj donas en rezultato cindron. Mineralaj ŝtofoj, liverataj al kreskaĵo per radikoj, estas en sufiĉa kvanto preskaŭ en ĉia tero, krom pura, senfrukta sablo. Sed por nutriĝi tiujn ĉi ŝtofojn estas necese, ke ili (ŝtofoj) estu en stato fluida kaj tre malforta: englutata per radikoj tera «suko» devas enhavi ĉi tiujn ŝtofojn proksimume nur en proporcio 1 : 1.000 : alivorte, — unu litro da akvo devas enhavi ne pli ol 1-2 gramojn da ŝtofoj. Superfluo de nutraĵo, t. e. pli granda enhavo de mineralaj saĵoj en fluidaĵo influas kreskaĵojn kiel veneno; ankaŭ ilia manko kaŭzas al kreskaĵoj diversajn malsanojn. Tia, ekzemple, estas ĥlorozo, kiam folioj de kreskaĵoj iom post iom fariĝas palaj, perdante sian hele-verdan koloron. Ĝi okazas pro manko de fero en kreskaĵo kaj similas tiun malsanon, kiun oni nomas, ĉe homo kaj bestoj malgrandsangeco. Ĉar malsanoj de besta organismo ofte estas sukcese kuracataj per arta nutrado, ekzemple, dum malgrandsangeco per enkonduko en organismon de fero, do naturscienculoj, (inter kiuj unuan lokon okupas rusaj scienculoj Ŝevyrev Mokrĵecki kaj aliaj) decidis ekprovi je spertoj, kian influon povas havi simila praktiko je kreskaĵoj. Komence tiuj ĉi spertoj (provoj) estis

neprosperaj, kaj montriĝis, ke kaŭzoj de neprosperoj devenis, de unu flanko, ĉar nutraj fluidaĵoj estis prenitaj tro koncentritaj, kaj de alia flanko — ĉe ilia enkonduko en kreskaĵon estis nenio farita por forigi aeron. Foriginte tiujn ĉi du malhelpojn, scienculoj ricevis rezultatojn tre kontentigajn: kreskaĵoj suferintaj ĥlorozon, post enŝprucoj, faritaj senpere en trunkon, tra tranĉaĵoj kaj malfermoj traboritaj en ŝelo, rapide saniĝadis. Pliboniĝo de sano de kreskaĵoj estis rimarkata nur en tiuj partoj de kreskaĵoj, kiuj estis super loko de enŝprucoj, kaj sur najbaraj branĉoj; farante tiujn ĉi operaciojn en diversaj lokoj de kreskaĵoj, oni atingadis komunan pliboniĝon de farto de kreskaĵoj. Tiuj ĉi provoj, prezentantaj lastan vorton de botaniko aplikata, en estonteco malkovros larĝan horizonton por ĝardenkulturistoj. Oni povas esperi, ke post iom da tempo oni povos ne nur « kuraci » kreskaĵojn per rimedo priskribita, sed ankaŭ plibonigi ilian specon. Ekzemple granda enfluo en kreskaĵon de kalio povas liveri al pomoj kaj aliaj fruktoj grandan bonodoron. Krom tio, tiu ĉi eltrovo, kredeble, poste helpos solvi demandon pri transplantigado de kreskaĵoj, atingintaj jam grandan kreskon, de unu loko alian kaj cet.

*El rusa lingvo tradukis*

J. MALFELIĈULO.



EN TURKUJO. — Ĉu estas vere, ke oni fermis la virinan gimnazon?

— Jes, ĉar la direktoro forkuris kun dekduo da lernantinoj kaj edzinigis ilin.

\*

MATEMATIKO. — *La instruisto:* Diru al mi Andreo, se via patro elfinas ian laboron dum du horoj, kaj via onklo elfinus la saman laboron dum tri horoj: dum kiom da horoj elfinas ili ambaŭ kune la saman laboron?

*Andreo:* Ili absolute ne elfinus ĝin; ĉar kiam miaj patro kaj onklo estas kune, ili neniam laboras, sed disputas.

\*

FANFARONO. — Du vaguloj interparolas:

— Jes, amiko, mia patro mortis pro la bono de l'patrolando.

— Kiamaniere?

— La ekzekutisto pendigis lin.

\*

EKSTORSIO. — Okjara Viktoro petole dancas en mezo de ŝatinde granda koto. Lia patrino ekvidas lin kaj terurigite admonas:

— Viktoro, Viktoro! elvenu tuj el tiu koto! Sankta Dio! viaj ŝuoj, ŝtrumpoj, pantalono...

— Ne, patrino, se vi ne donacas al mi dekcentiman mone-ron, mi eĉ kuŝigos min en la koton.

\*

MALFRUO. — Maljuna, nebela fraŭlino iras en la ĉambron de pentrartisto.

— Majstro, mi aŭdis, ke vi serĉas konvenan modelulinon por via pentraĵo de Venuso. Mi proponas min. Ĉu mi venas tro malfrue.

— Jes, almenaŭ dudek jarojn.

\*

CIKANO. — Karolino diris al mi, ke vi diris al ŝi tiun sekreton, kiun mi diris al vi, kaj pri kiu mi diris, ke al neniu diru ĝin.

— Ho, ŝi, la sentaŭgulino! Kiam mi diris al ŝi la sekreton, mi diris al ŝi, ke vi diris al mi, ke mi al neniu diru ĝin; kaj mi diris al ŝi ankaŭ, ke ŝi ne diru al vi, ke mi diris ĝin al ŝi.

— Bone, mi pardonos. Mi diros al ŝi, ke mi ne diris al vi, ke ŝi diris al mi, ke vi diris la sekreton al ŝi; do, ne diru al ŝi ke mi diris al vi, ke ŝi diris al mi, ke vi diris ĝin al ŝi.

---

# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## Al S-ro G. Kolowrat (*Daŭrigo kaj fino*).

En kia sekvado estas uzataj konsonantoj en nia lingvo? La plej komunaj konsonantaj finiĝoj estas tri: *n*, *j*, *s*. Pli precize:

<sup>1)</sup> « *n* » aldonebla al ĉiuj vortoj, finiĝantaj kun *o*, *a*, *e*, *oj*, aj kaj uzata kiel fino de vortoj: *en*, *tamen*, *kun*, *sen*, *nun*, *kvin*, *ajn*, *jen*.

<sup>2)</sup> « *j* » aldonebla al ĉiuj vortoj finiĝantaj kun *o* kaj *a*, kaj uzata kiel fino de vortoj: *kaj*, *plej*, *tuj*.

<sup>3)</sup> « *s* » aldonebla al ĉiuj verboj (kun antaŭa vokalo): *as*, *is*, *os* kaj *ies*, en vortoj: *des*, *ĝis*, *jes*, *ĵus*, *ses*, *trans*.

<sup>4)</sup> « *l* » uzata en fino de prepozicioj kaj konjunkcioj (*el*, *al*, *ol*, *ial*, *iel*.)

<sup>5)</sup> « *r* » uzata en fino de multnombroj, prepozicioj, (*kvar*, *per*, *por*, *inter*, *ĉar*; konjunkcioj *ekster*, *for*, *nur*, *preter*, *super*, *sur* ).

<sup>6)</sup> « *ŭ* » uzata en adverboj prepozicioj, konjunkcioj, multnombroj post *a*, farante kun *ĝi* la plej internacian diftongon: *aŭ*, *naŭ*, *almenaŭ*, *malgraŭ*, *anstataŭ*, *antaŭ*, *hieraŭ*, *morgaŭ*, *kontraŭ*, *baldaŭ*, *adiaŭ*, *laŭ*, *preskaŭ*, *ambaŭ*, *ankaŭ*, *ankoraŭ*, *apenaŭ*, *ĉirkaŭ*, *hodiaŭ*.

<sup>7)</sup> « *m* » uzata en fino de vortoj iam kun kunmetoj, kie *ĝi* anstataŭas antaŭan « *n* » por distingigo, « *dum* », « *iom* », kun kunmetitoj, *jam*, *krom*, *kvankam*, *mem*.

<sup>8)</sup> « *d* » uzata en fino de du vortoj: *sed*, *apud*.

<sup>9)</sup> « *ĉ* » uzata en fino de unu vorto: *eĉ* (tiu sono estis proponita de S-ro Bolak por ĉiuj adverboj de lia lingvo).

<sup>10)</sup> « *k* » uzata en tri vortoj: *dek*, *nek*, *ok*.

<sup>11)</sup> « *p* » uzata en unu vorto: *sep*.

<sup>12)</sup> « *t* » uzata en du vortoj: *post*, *cent*.

<sup>13)</sup> « *b* » uzata en unu vorto: *sub*.

Trarigardinte tiun tabelon, oni vidas ke D-ro Zamenhof uzis ĉiujn eblajn finiĝojn, ke li uzis ilin laŭ grado de ilia inter-

naciĉo, ke el unuaj sep, vere internaciaj finiĝoj ĉiu estas uzata por apartaj vortoj en kontraŭa proporcio al ĝia gramatika graveco kaj oftuzebleco, tio estas genie saĝa, ke lastaj ses neinternaciaj finiĝoj estis uzitaj nur por dek vortoj, precipe por vortoj pure latinaj kaj kun plena konscio ke eĉ malklara elparolo de malfacile distingeblaj « b » kaj « p », « d » kaj « t » ne malhelpas por aŭda kompreno en maloftaj okazoj, kiam ili estas uzataj en fino, sed helpas konservi eksteran kutiman latinan skriban formon, kaj ĉiu pli facile komprenos sed, apud, sub ol set, aput, sup, se eĉ li mem tiel elparolos. Krom tio multnombroj nur en certaj okazoj estas uzataj en ĝeneralaj difinigaj finiĝoj o, a, e, sekve 4 vortoj el io estas efektive finakceptemaj; decide nealiigeblaj je fino estas 3 vortoj: sed, eĉ, nek, kvankam laŭ nia ĝenerala regulo oni povas diri « mi deziras eldiri sedan opinion por sedigi Vian tezon, kiu havas sedojn, forgesitajn de Vi », sed tio estas tute teoria ebleco, dononta tro filozofan karakteron al la parolo. (« Apud », « post », « sub », kiel ĉiuj similaj prepozicioj, donas multe da kunmetitaj vortoj.)

Tiel trafe estis elektitaj sonoj por formigo de gramatikaj finoj de vortoj.

Nun ni rigardu kiel ili estis uzitaj.

Pri a, o, e, n, j mi parolos nenion, ĉar laŭ mia opinio S-ro G. K. bone kaj sufiĉe detale klarigis kialojn de ilia kunligo kun ilia uzo kaj signifo.

Mi deziras nur aldoni ion al liaj konsideroj pri verbaj finiĝoj. Nome S-ro G. K. trovas gradan ordon: estanto, estinto, estonto laŭ la malgrandiĝo de realeco kaj konateco de tempoj » kaj trovita de li grado de formoj estas sekvo de ordo de vokaloj en alfabeto (aeiou). Tio estas sprita kaj estus trafa, se rilato inter formoj kaj tempoj ne estus pli profunda. Rilato estas jena: la plej certa, la plej grava por estaĵoj vivantaj kaj agantaj estas tempo estanta, kiam ni agas, kiam ni parolas, kiun ni travivas, pasinta jam eliris el nia povo kaj influo, venonta estas ĉiam nekonata enigmo. Tial tute nature estanta tempo estas centra tempo. La plej klara vokalo, la vokalo de vokaloj estas « a », ĝi estas la centra vokalo, al kiu sin strekas ĉiuj aliaj vokaloj. Sekve « a » tute rajte estas signo de l'estanta tempo — tial: « as, ant, at ». Sed la estanta tempo ne estas daŭraĵo; tio estas nur momento, tio estas la fino, la morto de l'estinta tempo, la komenco, la nasko de l'estonta tempo. Tial estinta kaj estonta



tempo estas polusaj rilate al estanta kaj reciproke. Kiaj do estas polusaj vokaloj? Ili estas i, najbara kaj duonvokalo j, kaj u, najbara al duonvokalo ŭ. Tial, se « i » estas uzota por estinta tempo, « u » devas esti uzota por estonta, kaj kontraŭe. Rimarku tion kaj pripensu pluen. Kio estas estinteco? Tio estas senlima arĥivo, senlima tombejo, kie kuŝas ĉiuj forgesitaj kaj neforgesitaj agoj, okazintaĵoj, kiuj ekzistus jam eterne sen ŝanĝo, kiel postsignoj aŭ rememoroj, ili apartenas jam al senfina eterneco, estinteco estas *ĉiama* tempo, neniam mortanta mem, sed ĉion mortiganta, englutanta kiel tre bone imagis antikvaj grekoj. Ĉio kio trapasis en estintecon, eliris el aga stato ŝanĝa kaj eniris en ĉiaman senŝanĝeblecon. Kia formo verba respondas al tia ideo?

Infinitivo, kiel ĉiama, senŝanĝa, nedifinebla tempo... « Ami »... Kiam? Ĉiam aŭ... neniam « sub specie aeternitatis » hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, ĉar senfineco, senlimeco povas posedi ambaŭ signojn + kaj —.

Ni rememoru ke S-ro G. K. bone montris, kial « i » decas al infinitivo. Nun ni komprenas ke, se infinitivo finiĝas kun « i », signo de estinteco estos ankaŭ « i », tial « -is », « int », « it ».

Restas estonteco. Kio estas estonteco por ni, estaĵoj sentperoj, atendoj, kiam ni estas pasivaj; ĝi estas objekto de niaj antaĵaj kaj pensantaj? Ĝi estas objekto de niaj supozoj, revoj, esdecidoj, ordonoj, deziroj, de nia volo, peroj, zorgoj, kiam ni estas agantaj. Per nia volo ni faras estontecon objekto de nia spirito kaj aliaj fortoj kaj ĉiuj esprimoj de nia volo rilatas al estonteco kiun ni preparas. La modo « ordona » estas formo de vorto esprimanta tiun kapablecon antaŭvidi, antaŭzorgi, antaŭordigi. En Esperanto ĝia signo estas « u ».

La plej proksima al agema preparigo de l'estonteco laŭdezira, estas ĝia atendado, prijuĝo de eblecoj, sin kaŝantaj en nekonata kvankam ofte proksima estonteco, ni supozas ni divenas, sed ĉiuj niaj pensoj pri estonteco estas vole-nevole kondiĉotaj: se tiel, bone, se ĉi tiel, malbone. Tio estas modo kondiĉa « -us », montranta ne volon nian, sed nekonatajn venontajn kondiĉojn, kiuj kondukos nin kaj niaj agojn, eble nian volon mem.

Sed estonteco, malgraŭ nia pacia deziro influi ĝin, eĉ krei ĝin, en plej granda parto, tiel same, kiel estinteco, estas sendependa de niaj penoj, zorgoj, projektoj, revoj. La suno revenos, ĉar ĝi kutime revenas, ĉar ĝi ĉiam revenadis. Por tiuj faktoj,

starantaj inter nia volo, niaj supozoj kaj nuna kuranta momento ni ankaŭ bezonas formon apartan. Por tio ĉi ni havas « os », « ont », « ot ». Kial « o »? Ĉar « o » fonetike staras inter « u » kaj « a »  $\left( o = \frac{a + u}{2} \right)$  kiel « e » staras inter « i » kaj « a »  $\left( e = \frac{a + i}{2} \right)$ . E estas malpli belsona ol o kaj feliĉe sen necesa por verbaj formoj.

Ni jam trarigardis rilaton inter verbaj formoj kaj ĝiaj signoj. Mi vidas, ke mia letereto fariĝis jam tro longa; tial mi mal-longe montros iajn aliajn rimarkindajn rilatojn:

1) Adjektivo estas predikato daŭra, estas verbo kun ĉiama tempo, estas ĉiama prezenteco de certa trajto. Kiam mi diras: talenta verkisto, mi diras ke verkisto *estas* talenta en ĉiu momento kaj tute konsekvence ankaŭ je tiu lingve filozofia rigardo uzi por adjektivoj vokalojn signifantan kunekzistado (de parolado kaj de objekto de parolo, de parolanto kaj de apero priparolata, kio estas karaktera trajto de « estanta » tempo, ĝi signifas nunecon aŭ kunekzistadon).

2) Participoj aktivaj kaj pasivaj distingiĝas per « n », *kiu estas signo de aktiva konstruo de frazo:*

*n-konstruo:*

I Li frapas min

II li estas frapanta min.

*sen n-konstruo:*

mi estas frapata de li.

« Genio neniam dormas » kaj kiam li ŝajne dormas li kreas ion, kio estas des pli saĝa, ju pli vi ĝin studas, tial genioj estas ĉiam junaj kaj interesaj.

N. P. EVSTIFEIEFF

---

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro Th. Cart, prezidanto; Paul Fruictier, Ch. Vérax, deleg.

Pro Benoit, Dr. Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm: V. Chaussegros. Teknika direktoro: Lengyel Pál.

**Hjalmar Bäckström**, *Saltsjöbaden*, proksime Stockholm, Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.

---

S-ro **PIERRE DÉRIBÉRE-DESGARDES**, medicina kaj scienca studento, 76, rue des Saints-Pères, Paris, interesiĝante pri medicino, botaniko kaj fitoterapio, deziras korespondadi pri tio.

---

---

## ★ INTERNACIA SIGNO

aprobita de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomendata de S. F. p. p. E., butontrua, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj : 1 franko. — Rabato al la grupoj por almenaŭ 12 : 20 % . — Sin turni al S-ro

**Emile P. GASSE**, 105, Lycée, Le Havre, Franclando.

---

---

## ADRESARO DE KOMERCISTOJ

### akceptantaj uzadon de Esperanto.

**AVIZO.** — La unua enpresado estas senpaga ; ĉiu nova enpresado kosta 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn ; por niaj abonantoj : 12 presoj 2 frankojn.

**Paris**, 33, rue Lacépède, — *Preso Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

**Glasgow**, 137, Weet Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo : « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

**Barcelono** (Hispanujo), Puerta-Ferrisa, 30. — *Johano Rosals*, librovendisto. Vendado de Esperantaj verkoj. Specialaĵo en libroj kaj utilaĵoj por lernejoj.

**Valence d'Agen** (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

**Hódság** (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj ; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

**Paris**, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

---

---

## Peto al niaj Abonantoj kaj klientoj

Ni ankoraŭ tre petas niajn klientojn ke ili bonvolu

Ciam ripeti legeble sian ĝustan kaj tutan adreson sur ĉiuj siaj leteroj, por faciligi al ni la laboron kaj elserĉojn, kaj forigi prokraston.

Skribi, sur apartaj folioj, la diversajn korespondaĵojn, kiuj rilatas al 1-e, mendoj kaj abonoj ; 2-e, sciigoj por la gazetaro.

Atenti pri la prezo de komercaĵoj *afrankite* kaj *neafrankite*.

Al la amerikaj kaj anglaj klientoj ni faras ankaŭ la peton neniam sendi monerojn en siaj leteroj ; ĉiam skribigi sur la internaciaj mandatoj kiuj devas esti adresataj al *Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris*, la nomon de la poŝtoŝeĉejo pagonta : « *Bureau de poste n° 29, rue Monge, Paris.* » Sen tiu surskribajo, ni havas multajn malfacilaĵojn por enkasigi tiujn mandatojn.

Tiamaniere, ĉiuj faciligos kaj rapidigos la funkcion de niaj diversaj oficoj ; por tio, al ĉiuj antaŭdankon.

*Lingvo Internacia.*

---

# LA REVUO

**Internacia monata literatura gazeto  
kun la konstanta kunlaborado**

**de D-ro L. L. Zamenhof.**

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura ; ĝi enhavos novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k.c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povas naski disputojn, estos malakceptata de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

*La 1-a numero aperos la 1-an de septembro 1906, okaze de la II-a Universala Kongreso de Esperanto.*

**Kosto** : ĉiu numero **0 fr. 50**  
jara abono **6 fr.**

*ONI POVAS ĜAM DE NUN ABONI*

*ĉe la Librejo* **HACHETTE** kaj **K-o,**  
**79, Boulevard Saint-Germain, Paris.**

---

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

